

Esperanto-Brno

Esperanto-Brno - Informoj pri Brno - Esperanto-movado

HISTORIO DE ESPERANTISTA KLUBO EN BRNO

Josef Vondroušek

Jam en la jaro 1900 estis gvidataj en Brno la unuaj kursoj de Esperanto kaj post konsiderinda strebado kaj celkonsciaaj laboroj estis alpaŝite en la jaro 1901 al fondo de Aŭstria Societo Esperantiata en Brno, en la Laborista Domo, Jůza-strato, nuna Marks-strato. Ĝi estis la unua esperantista societo sur teritorio de tiam Aŭstrio-Hungario, la unua en la meza Eŭropo. Fondintoj de la Societo estis redaktoro Karel Pelant, ĵurnalisto neordinare sprita kaj inĝenia, kaj Václav Kovanda, unu el la postaj fondintoj de Laborista Memhelpa Kooperativo ABELO. Tiam Landestrejo en Brno rifuzis doni permeson al fondo de la Societo, argumentante por sia negativa decido per tio, ke Esperanto ne necesas, ĉar ekzistas la germana lingvo. Nur interpelacio de eminenta laborista deputito Josel Hybeš en la viena parlamento eblifis fondon de la Societo. En junio 1901 do estis fondita la Societo kaj konstituita la unua komitato, kies prezidanto estis elektita Karel Pelant, vicprezidanto K. Černík, sekretario V. Kovanda kaj kasisto Jan Kajš. Inter pluaj komitatanoj estis Karl Steier, aŭtoro de lernolibroj kaj vortaroj por germanoj. Post kelke da tempo li daŭre transloĝiĝis en Svislandon kaj poste en Germanion kaj revenis al Brno nur post la dua mondmilito mortmalsana el germana koncentrejo. Brna esperantistaro zorgis pri li kaj post nelonge proprakoste prizorgis lian sepulton.

En la Societo estis ĉeĥoj kaj germanoj kaj disvolvis viglan aktivecon aranĝante prelegojn kaj plurajn kursojn en la urbo kaj antaŭurboj. La unuajn kursojn gvidis Jan Kajš, Dominik Konečný, Karl Steier kaj Josef Zábaj. Redaktoro K. Pelant verkis bonegan broŝuron Ideo de la Lingvo Internacia kaj konata poligloto kaj filozofo František Vymazal verkis lernolibron Esperante facile kaj rapide.

En la jaro 1905 decidiĝis la Societo dividi la laboron kaj fondi memstarajn grupojn por ĉiu nacio kaj tiel estis fondita Klubo de Ĉeĥaj Esperantistoj en Brno, kiu komencis tuj bonege prosperi kaj kies fondo estis salutita de multegaj telegramoj. Multe impresis grandaj kolor-afiŝoj, notantaj aktualajn sukcesojn en la movado kaj anoncantaj samtempe ses kursojn. Prezidanto de la klubo estis fotografisto František Racek kaj en la sekvinta jaro prezidantiĝis Jan Kajš. Samjare estis fondita filio de la klubo en Řečkovice, kie ankaŭ estis aranĝitaj prelegoj, kursoj, amikaj vesperoj kaj ekskursoj. Gvidanto estis instruisto Antonín Valoušek.

En la jaroj 1907-1908 gvidis la klubon prezidanto Antonín Tomášek, tajloro. Kursoj okazis dufoje semajne en la tiam Giskra-strato, nuna Lenin-strato, kunvenoj

okazadis en restoracio U Jonáků, en la tiama Rudolf-strato, nuna strato Česká. Kurso, gvidita en la jaro 1907 en komerca lernejo de profesoro Bohumil Hollman, estis la dua tiuspeca. Pluan kurson en komerca lernejo gvidis en la sekvinta jaro Dominik Konečný.

En la jaroj 1908-09 aktiveco de la klubo malvigliĝis, ĉar ĝi estis trapasanta, same kiel la tuta movado, reformkrizon, konatan sub nomo Ido. La kunvenoj daŭrigis dufoje monate en Stopka-restoracio. Prezidanto en la jaro 1909 estis revizoro Albín Kroupa, partopreninto de la Universala Kongreso de Esperanto en Kembriĝo. El tiu tempo tute mankas informoj pri la klubo, mankis kia ajn informo sur paĝoj de Časopis českých esperantistů, kvankam informoj el diversaj lokoj okupis regule du-tri paĝojn. La klubo mankas ankaŭ en la membrolisto de Unio.

Necesas mencii epizodon el la jaro 1910. Ĉeĥa Komerca Akademio de Brno aranĝis 24-tagan ekskurson al Balkana Duoninsulo kaj Malgranda Azio. En la programo estis vizito de urboj Budapeŝto, Beogrado, Niŝ, Sofio, Istanbul, Smirno, Ateno, Patrajo, Korinto, Korfuoj kaj Brindisi. Aranĝantoj de la ekskurso konsciante la lingvajn barojn zorgis, ke inter la partoprenantoj estu homoj sciantaj hungare, serbokroate, bulgare, turke, greke kaj itale. Sed jam en Budapeŝto finiĝis la iluzioj, malfacilaĵoj multiĝis kaj en Beogrado oni povis paroli pri malsukceso de la ekskurso. Sed inter la ekskursantoj estis du anoj de la klubo en Brno, kiuj en la kriza momenta eklaboris, anoncatis al delegitoj kaj kluboj alvenon de la karavano kaj de tiam ĉio kvazaŭ sorĉe ŝanĝiĝis. La ekskursantoj estis ĉie atendataj de lokaj esperantistoj, kiuj volonte helpis, donis necesajn informojn, zorgis pri amika etoso kaj akompano tra urboj kaj ĉirkaŭaĵo. Kaj tiel estis dum la tuta vojo, ĉu en Sofio, Istanbul, Smirno, Ateno k.a. Dum navigo trans la Egean maron montriĝis, ke la ŝipkapitano estas esperantisto kaj la bona rezulto estis, ke ĉiuj partoprenintoj ĝuis la unuan klason anstataŭ la trian.

Prezidanto de la klubo en la jaroj 1910-1911 estis Antonín Waiser, oficisto. La klubkunvenoj okazadis en restoracio U Jonáků kaj pli poste en strato Kozí. La ĉefa agado de la klubo estis la kursoj kaj ilia afiŝado.

En la jaro 1911 solenis la klubo la unuan jardekon, la 3-5. de junio. Venis esperantistoj el multaj lokoj de la tiama monarkio kaj saluttelegramoj el la tuta Eŭropo. Ankaŭ D-ro L.L. Zamenhof sendis salutleteron, kiu estis akceptita kun granda entuziasmo. Asocion de Ĉeĥaj Esperantistoj reprezentis D-ro Stanislav Kamaryt, Akademian Fakon Esperantistan Rudolf Hromada, ambaŭ el Prago. La kunvenojn prezidis D-ro Stanislav Schulhof el Pardubice, referis D-ro Stan. Kamaryt, solena oratoro estis direktoro Josef Krumpholtz, unu el la plej famaj Komeniologoj. Amika vespero okazis en Litovel-restoracio, kie samideano Václav Odložilík detale priskribis la vojaĝon de la lernantoj de la Ĉeĥa Komerca Akademia de Brno al la Balkana Duoninsulo. Inaŭguro de la jubilea soleno okazis en malgranda halo de Besední dům. D-ro Stan. Kamaryt parolis pri la laboro de la klubo en la pasinta tempo kaj belaj rezultoj, kaj atentigis, ke en la venontaj jaroj necesos komenci kun la interna laboro. Vespere okazis kunveno kun programo, estis deklamitaj poemoj de Schulhof, monologo el Ifigenio en Taŭrido k.a. kaj la sekvintan tagon oni ekskursis al Macocha. La jubileo tre sukcesis. Prezidanto en la jaroj 1912-1913 estis Dominik

Konečný.

Venis la unua mondmilito, terura suferado por ĉiuj, la laboroj por la movado estis interrompitaj.. Kaj kiam venis fino de la milito, la homoj sopiris pri la eterna paco kaj subtenis ĉion, kio povus ĝin firmigi kaj sekurigi. Tial ankaŭ Esperanto, kreita por la amikeco inter la nacioj, mirige vastiĝis. Kaj tiel en la jaro 1919 reviviĝas la klubo. Kiel prezidanto estis elektita Inĝeniero Jaroslav Sitko. Okazis publikaj kursoj de la internacia lingvo en pluraj lernejoj, por fervojistoj kaj blinduloj. profesoro Inĝeniero Vincenc Kroužil plurfoje prelegis pri Esperanto kaj gvidis kursojn en Industria lernejo kaj Komerca Akademio. Aperis pluaj eminentaj laborantoj: fakinstruisto Jan Šembera kaj Josef Jeřábek, gimnazia profesoro, ĝia posta direktoro Rudolf Fridrich, D-ro Josef Barviř kaj multaj aliaj. En la jaro 1920 ŝanĝis la klubo sian nomon je Esperantista Klubo en Brno, Ĉeĥoslovakio. La klubo bone prosperis, ĵurnaloj ofte raportis pri la movado, estis aranĝita ekspozicio en librovendejo de Barvič. La kunvenoj okazis en Akademia kafejo. Ekde la jaro 1921 estis prezidanto de la Klubo profesoro Inĝ. V. Kroužil. Daŭre estis gvidataj kursoj en la plej diversaj lernejoj, okazis publikaj prelegoj en diversaj societoj. Profesoro V. Kroužil prelegis en la Societo de Inĝenieroj kaj Arkitektoj, direktoro J. Krumpholc en Instruista Asocio de Brno. Aperis ĉeĥa traduko de la angla broŝuro de T. Gueritte: Esperanto, internacia lingvo de inĝenieroj, fare de prof. V. Kroužil kaj de la sama aperis esperantigita verko de Arne Novák *Ĉeĥa literaturo laŭ la birdperspektivo*. Kaj venis oficiala apreco de la kultura signifo de la internacia lingvo: per ministeria dekreto el la 27.10. 1921 profesoro V. Kroužil estis nomumita ekzamena komisararo de Esperanto por burĝaj lernejoj. En Esperanto-traduko de D-ro J. Barviř aperas kompilaĵo Moravia karsto, poste Ligado de tukoj kaj Pilgrimo al Sankta Antonio, belaj folkloraj verkoj de J. Úprka, kaj de J. Šembera Gvidlibro tra Brno. En kadro de la 13-a Universala Kongreso de Esperanto en Prago, en la jaro 1921, organizis la Klubo ekskurson por 800 partoprenantoj al Macoĥa.

Frukte de la Klubo en la jaro 1922 estis profesoro Rudolf Fridrich, posta gimnazia direktoro. Pozitiva ago por la tuta ĉeĥoslovaka Esperanto-movado estis la I-a Ĉeĥoslovaka Esperanto-Kongreso en Brno en la sama jaro. La kongreson partoprenis ĉ. 300 homoj el la tuta respubliko kaj multaj eksterlandanoj. La kongreso okazis en Parlamento de la Malnova Landa Domo. Usonano, franco, ruso, polo kaj germano salutis la kongreson. En la jaro 1923 partoprenis la Klubo Ekspoziciajn Foirojn de: Brno per propra ekspozicio en konstruaĵo de la malnova komerca akademio. La ekspozicion vidis dekmiloj da homoj, ĝi alportis ankaŭ financan profiton al la Klubo kaj krome ĝi ricevis diplomon por modela aranĝo. Kaj denove frunte de la klubo en la jaro 1924 estas Inĝ. J. Sitko. Aperis traduko el la franca lingvo fare de gesinjoroj Fridrich Svaz národů o esperantu (Ligo de nacioj pri Esperanto). Al la Klubo aliĝas direktoro de komerca lernejo Josef Bednář, kiu venas kun modernaj propagandaj metodoj. Li eldonis reklame tre efikan lernolibron de Esperanto en dek horoj, kaj libron de gajaj rakontoj Barono Mensogbabilulo.

Esperanto estas daŭre instruata en diversaj lernejoj kaj kursoj, al fervojistoj, policistoj kaj en Fremdul-Asocio. Prezidanto de la Klubo en la jaroj 1925-1928 denove fariĝis profesoro R. Fridrich kaj aperas lia traduko Koboldo Ondra de J. Mahen. Somere en la jaro 1925 alveturis 30 eksterlandanoj el naŭ nacioj por viziti la

abismon Macoĥa. La Klubo prizorgis la akcepton kaj akompanon.

La jubileon de 25 jaroj solenis la Klubo en decembro 1926 en malgranda halo de Besední dům. Partoprenis multaj samideanoj, reprezentantoj de diversaj kluboj kaj venis amaso da salutleteroj. En kadro de la soleno estis preparita valora kultura programo.

Perradia kurso de Esperanto komenciĝis en la jaro 1927, gvidis ĝin direktoro J. Bednář en neordinare interesa maniero kaj la sukceso estis vere sensacia. La kurso estis publikigata samtempe en revuo Radio-Journal. Ankaŭ en semajna gazeto Nový lid (Nova Popolo), la plej disvastigita etika revuo (eldonkvanto 250 000 ekz.), aperas merite de direktoro Ota Petr, konstanta Esperanto-kurso kaj rubriko, kiujn gvidis sekretario de la Klubo Josef Vondroušek dum kvar jaroj. O. Petr estas ankaŭ aŭtoro de tre bona Vortaro Esperanta-ĉeĥa. En la sama jaro aranĝis la Klubo solenon omaĝe al 40 jaroj de Esperanto en saloneto de Besední dům. El pluraj programeroj nepre citinda estas koncerto de Kantista Kvarteto de J. Šembera kaj solo- dancoj de Zora Šemberová, posta unua baletistino en la Landa Teatro.

En Brno okazis en la jaro impona Ekspozicio de la Nuntempa Kulturo. La Klubo atingis eldonon de esperantlingvaj prospektoj kaj per laboro de kelkaj membroj dissendis 5000 ekzemplerojn en la tutan mondon. La Ekspozicion vizitis dekmiloj da eksterlandanoj, inter ili multaj esperantistoj. Grandan intereson pri la Ekspozicio uzis la Klubo kaj kunvokis al Brno Renkontiĝon de moraviaj kaj sileziaj esperantistoj la 7.-8. de julio 1928 kun programoj labora kaj amuza. Tiam la Klubo ne estis reprezentita en la Ekspozicio per propra stando, tamen Esperanto estis reprezentita fare de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista kaj en la lerneja fako per laboro de lernejestro Albín Neužil el Olomouc.

Prezidanto de la Klubo en la jaro 1929 fariĝis direktoro J. Bednář. En la sama somero venis al Brno ĉ. 400 eksterlandanoj, revenantaj el la Universala Kongreso de Esperanto en Budapeŝto. La Klubo akceptis ilin, aranĝis por ili amikan vesperon en Besední dům kaj trarigardon de la urbo. Plurajn grupojn gvidis tra la urbo ankaŭ policistoj kun ŝildeto Esperanto, kio vekis favoran impreson en la gazetoj.

Prezidanto en la jaro 1930 estas J. Vondroušek. Tia, la Klubo komencis eldonadi multobligitan informilon sub titolo Informa Bulteno de Esperantista Klubo en Brno. Nome tial, ĉar la revuo La Progreso, unu el la plej bonaj naciaj gazetoj de la Esperanto-movado ĉesis aperi pro financaj malfacilaĵoj kaj necesis kontaktigi ĉiujn lokajn anojn. La informilo estis modesta, kvarpaĝa, sed ĝi helpis al konservado de la solidareco kaj fideleco al la movado. Ĝi aperadis neregule, dum du jaroj kaj duono aperis entute 14 numeroj. Redaktis s-ano Ing. Ernesto Sonnenfeld, elmigrinta en la jaro 1938 al Montevideo kaj estas tradukinto de ĉefverko de la argentina literaturo Martin Fierro de Jose Hernandez.

Nova prezidanto de la Klubo en la jaroj 1931-1932 estis inspektoro František Baďura. Ĝis tiu tempo la klubaj kunvenoj kaj ankaŭ kursoj okazadis ekde la jaro 1923 en lernejo Veveří strato 28. Sed el la kreskanta kluba vivo ne sufiĉis la klaso kaj tial estis trovita nova klubejo en la tiama hotelo Passage, klubejo apartigita, bone lokita, plene konvenanta al la kulturaj kaj societaj bezonoj. En la jaro 1931 aranĝis la Klubo du publikajn paroladojn de usona ĵurnalisto Jozefo Scherer el Los-Anĝeleso, speciala komisiito de Internacia Centra Komitato en Genevo, entrepreninta la vojaĝon

ĉirkaŭ la mondon kun la celo vastigi sciojn pri la internacia lingvo.

La 5-a Kongreso por la Seksa reformo, internacia kuracista kongreso okazis en Brno septembre 1932. Esperanto estis unu el la oficialaj lingvoj. La Klubo preparis tradukon de la ampleksa programo kaj la kluba anaro amase partoprenis ĉiujn publikajn kunvenojn de la kongreso. Tutmonda kapacito tiurilate, D-ro Leumbach el Kopenhago prelegis en Esperanto.

En la sama jaro la Klubo donis impulson al disaŭdigoj en la internacia lingvo. La unua perradia prelego (parolis prezidanto de la Klubo F. Baďura) havis internacian eĥon, sekvis pluraj prelegoj kaj ekde tiam Esperanto havis firman lokon en radio de Brno. Esperantlingvaj prelegoj estis regulaj, kunlaboris pluraj anoj de la Klubo (J. Ŝamla, M. Strejčková, reĝisoro Dalibor Chalupa, kaj poste speciale profesoro Theodor Kilian el Třebíč). La prelegoj informis la mondon pri nia ŝtato kaj popolo, vivo kaj artoj. Je la esperantlingvaj prelegoj reagis miloj da homoj el ĉiuj anguloj de la mondo, aŭskultantoj kompletigadis al si sciojn pri Ĉeĥoslovakio, kreskis simpatioj al nia ŝtato. Laŭ sugesto, instigo kaj senpera helpo de Inĝ. Antonín slavík, direktoro de Radio-Journal en Brno estis disaŭditaj dramverkoj (RUR, La Blanka Malsano, Grandhotelo Nevada), operoj Vendita Fianĉino, operetoj Pola Sango, Sur Rozoj Sternite, kabaretoj ktp. La prezentadoj havis maksimume altan nivelon, ĉar en ili rolis la plej eminentaj aktoroj kaj artistoj de la Landa Teatro en brno, kiel K. Höger, Švábíková, Lázničková, Bezdíček, Leraus k.a. Plenrajte la radio-stacio de brno, nomata "Verda Stacio", havis simpatiojn de la tutmonda esperantistaro pro siaj brilaj programoj. La plej granda danko apartenas al la neforgesebla direktoro Inĝ. Antonín Slavík, kiu pro sia ardo al Esperanto daŭre enskribiĝis en ĉies korojn, kiel patrioto kaj esperantisto. Inĝ. Antonín Slavík estis ekzekutita en la jaro 1942 en Berlino de nazioj.

La Klubo ligis kontaktojn kun la eldonejo Literatura Mondo kaj komisie vendadis ties ĉiujn eldonaĵojn kaj per konstanta libroekspozicio en la klubejo vastigis intereson pri la literaturo, la libroj estis aĉeteblaj je la plej favoraj kondiĉoj kaj venadis en la manojn de multaj interesatoj.

La VI-a Ĉeĥoslovaka Esperanto-Kongreso okazis la 27.-29.9.1935. Interkonatiĝa kaj amika vesperoj okazis en salono de hotelo Passage, inaŭguro en stadion, laborkunsidoj en Kleriga Domo de Brno kaj la artvespero denove en la granda halo de Stadion. Rolis anoj de la Landa teatro en Brno. La sekvintan tagon oni povis ceesti Diservon en la internacia lingvo kaj partopreni la faman auto-konkurson sur Masaryk-Ringo. La interkonatiĝan vesperon partoprenis s-ano Bianco el Genovo, fama aŭto-konkursanto kaj la tutan kongreson ĉeestis la registara konsilisto Hugo Steiner, fondinto de la Internacia Muzeo de Esperanto en Vieno. La kongreso estis kunvokita nur fine de junio, do efektivaj preparoj povis disvolviĝi nur en septembro. Venis 209 homoj kaj venis sulutoj el Ministerio pri eksterlandaj aferoj, el Ministerio pri lernejoj, Ministerio de komerco kaj de multaj aliaj organizaĵoj. Same venis multaj salutleteroj el eksterlando. Jen, kion skribis la revuo Ligilo pri la kongreso: "La aŭguroj, kiuj klopodis diveni la sukceson de la Ĉeĥoslovaka Esperanto-Kongreso timis malsukceson. Ne mirinde, ĉar la cirkonstancoj estis ege malfavoraj. La decido pri aranĝo de la kongreso estis farita pli malfrue ol kutime, ne estis eble propagandi en la unua jarduono, la unuaj sciigoj atingis la esperantistaron, kiam ĝi ĵus sin preparis por libertempado, dum la someraj

monatoj ne aperis la Ligilo, ne aperis Bulteno. La vojaĝemaj samideanoj elspezis sian monon okaze de la Universala Kongreso de Esperanto en Italio. . . . Kaj tamen la kongreso sukcesis, sukcesis malgraŭ ĉiaj malfacilaĵoj kaj pli ol 200 kongresanoj aliĝis. Ankaŭ laŭ la financa vidpunkto ĝi evitis deficiton. Ni ĝojas pro tiu fakto, ne nur pro la movado, sed ankaŭ pro tio, ke tiel senlaca laboro de brnaj esperantistoj sub gvido kaj ĉefa helpo de s-ano Vondroušek kaj lia ĉarma edzino alportis la deziratan sukceson. . . "

Prezidanto de la klubo por la jaro 1933 estis elektita František Válka, aŭtoro de la verketo *Všude dobře, doma nejlépe* (Ĉie bone, hejme plej bone). La libreto rememoras la dudekjaran restadon de la aŭtoro en Brazilo. Tiujare eniras en la komitaton konata kaj populara radio-laboranto, aŭtoro de sukcesa lernolibro kaj tradukinto de verko de Karel Čapek *La Blanka Malsano* profesoro Theodor Kilian el Třebíč. Li gvidis neordinare sukcesan radio-kurson en la jaro 1932-1933, entute tri perradiajn kursojn de la internacia lingvo. Plua prezidanto en la jaroj 1934-1935 estis Jaromír Hoffner. Oktobre 1933 la Klubo aranĝis prelegon de negro Kola Ajay el Lagoso en Niĝerio. La prelego okazis en plenplena halo de Masaryk-Universitato kaj krome okazis du prelegoj en lernejoj. En novembro samjare parolis en la granda halo de Stadiono, laŭ invito de la Klubo D-ro Augustin Pitlík el Prago pri la Tutmonda Ekspozicio en Ĉikago. La prelego, en la ĉeĥa lingvo, bonege sukcesis.

La klubo disponis pri pluraj inform-vitrinoj, ankaŭ en la stacidomo. Ĉiujare funkciis du eĉ pli publikaj kursoj, ankaŭ en lernejoj kaj okulfrape afiŝataj. Nova prezidanto en la jaroj 1936-1940 fariĝis prof. Th. Kilian. Sekretario de la klubo estis seninterrompe ekde la jaro 1928 J. Vondroušek.

Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj, jam la 18-a, okazis en Brno la 4.-9.8. 1936. Partoprenis ĝin pli ol 250 homoj el 14 landoj. Preparis kaj organizis ĝin Klubo de Katolikaj Esperantistoj en Brno, sub prezidanteco de Aleš Berka. La Klubo anonciĝis al kunlaboro kaj memstare instalas grandan Internacian Ekspozicion de Esperanto en haloj de la Industria Muzeo. Abundega materialo estis akirita de preskaŭ ĉiuj Esperanto-organizaĵoj en la mondo. La ekspozicio estis granda entrepreno kaj havis grandan favoran eĥon ĉe la publiko kaj en ĵurnaloj.

En aŭtuno de la sama jaro estis invitita al Brno lektoro de Esperanto ĉe universitato en Tartu, estono Henriko Seppik, por gvidi la kursojn laŭ Ĉe-metodo. La kursojn antaŭis grandskala kampanjo en ĵurnaloj per artikoloj, anoncetoj, reklamo en pluraj kinejoj, multaj afiŝoj, estis invititaj pluraj instancoj, korporacioj, ktp. La unuan lecionon de H. Seppik partoprenis kelkcent homoj kaj sekvis ses multnombre frekventataj kursoj. Okazis du intervjuoj en la radio, du publikaj geografiaj prelegoj kun diapozitivoj. Kaj en januaro 1937 denove venis Jozefo Scherer en Ĉeĥoslovakion kaj prelegis en Brno kaj H. Seppik ankaŭ venis laŭ invito por prelegi pri Laponio.

Somere 1937 okazis unu el la plej memorindaj okazaĵoj de la Klubo. Brnon vizitis sepmembra grupo de eminentaj Esperanto-poetoj kaj verkistoj el Budapeŝto, inter ili la plej granda poeto de mondformato Kolomano Kalocsay kaj Ludoviko Tárkony. Ĉiuj ŝatataj gastoj restis gaste en Brno ankoraŭ kvin tagojn, post la glora literatura vespero, kiun multnombre ĉeestis la brna samideanaro kaj el la ĉirkaŭaĵo, kaj estis akompanataj de alta respekto kaj amo.

En la jaroj 1937 kaj ĉefe en la jaro 1938 direktis la Klubo ĉiun sian aktivecon

al ĝusta informado de eksterlando pri nia ŝtato.

De jaro al jaro gradigis la Klubo sian aktivecon per kursoj, prelegoj, ĉefe de eksterlandaj prelegistoj k.a. Ĝi akceptadis gastojn el eksterlando kaj informadis ilin ĝuste pri la ĉeĥoslovakaj problemoj. La Klubo aĉetis titolojn je Defendo de la Ŝtato, estis reprezentita per unu komitatano (J. Vondroušek) en la Ĉeĥoslovaka Pacdefenda Solidareco, kontaktiĝis kun pluraj eksterlandaj kluboj, ĉefe kun Esperantista Klubo en Londono, al kiu estis sendataj ampleksaj inform-artikoloj kaj eĉ dufoje aperis en iu londona ĵurnalo kiel ĉefartikoloj kaj estis legitaj ankaŭ antaŭ la londona urbestro. Por aŭtuno 1938 estis entreprenitaj vastetgaj aranĝoj, ampleksa kampanjo, sed ĉio preterpasis pro la krizaj kaj tragediaj septembraj kaj oktobraj tagoj. Post la kapitulaco aktiveco de la Klubo tre moderiĝis, sed ne ĉesis. Kaj en la jaro 1939 nova kurso, sed ĝi restis nefinita, intervenis la okupacio. En aprilo 1939 alveturis gestapo al la tiama prezidanto de la Klubo prof. Th. Kilian postulante de li la kluban korespondaĵon. Samtempe alveturis aliaj gestapanoj al la tiama vicprezidanto Hoffner kun la sama postulo. Ambaŭ samideanoj deklaris, ke la klubaj korespondaĵoj troviĝas ĉe sekretario. La sekvintan tagon venis gestapanoj al J. Vondroušek, sed tiu lerte informita de Kilian, forigis ĉiujn leterojn, kiuj povis esti dangeraj. Kiel jam estis menciite la klubo ekde aŭtuno 1937 ĝis marto 1939 korespondis kun pluraj kluboj, ĉefe kun la klubo en Chingford apud Londono kaj informis la anglajn esperantistojn laŭ vero pri situacio en ĈSR, pri germanaj planoj kaj postuloj, la maja mobilizo, pri minoritataj rajtoj, minoritata juro ĉe ni, pri la septembra krizo kaj fina kapitulaco ktp. Ĉe J. Vondroušek estis faritaj du traserĉoj, la korespondaĵo estis konfiskita kaj protokolibro el la jaro 1938. Fine gestapo ordonis forigon de stacidomaj tabuloj kaj likvidon de la Klubo. Tio okazis en junio 1940.

Sed ankaŭ tiam ĉiu firme staris sur sia loko kaj nur fine de aprilo, kiam omenciĝis domtraserĉoj kaj kruda enketado ĉe gestapo, estis rekomendite al la kursanoj disiri. La klubvesperoj plu daŭris, ankaŭ en la jaro 1940, sed ne plu en aparta ejo. En junio 1940, laŭ ordono de gestapo kaj minaco, ke sekvos la plej severaj punoj, la Klubo formale likvidiĝis. Malgraŭ tio la kunvenoj sekrete plu daŭris, ĝis aŭtuno 1941, kiam estis proklamita escepta punrajto.

Plenajn ses jarojn daŭris la milito detruinta kelkdek milionojn da homoj kaj senmezurajn valorojn. Kaj kion neniu ĉesis kredi realiĝis, plejparte ni ĝisvivis la grandegan feliĉon, la pacon kaj liberon.

Tuj post finiĝo de la milito kunvenis pluraj klubanoj por esplori laboreblojn por la internacia lingvo kaj ĝiajn ŝancojn. Estis decidite rekomenci la agadon, kio estis anoncita al la Centra Nacia Komitato en Brno, tuj estis ricevita parola konsento kaj iom pli poste ĝi estis konfirmita ankaŭ skribe. Komenciĝis tempo de ĝoja laboro. La unua postmilita kunveno okazis la 12.6. 1945 (je datreveno de likvido de la klubo la 12.6.1940) kun granda partopreno. Kun la malnovaj laborantoj aperis novaj, kiel profesoro de konservatorio Vilibald Scheiber, D-ro Jan Geryk k.a. Prezidanto estis elektita Josef Vondroušek, membro kaj aktivulo de la Klubo ekde la jaro 1923 kaj konstanta sekretario de la klubo ekde la jaro 1928. Esperantista Klubo en Brno estis la unua klubo en la liberigita Ĉeĥoslovakio, kiu rekomencis sian agadon. Al ĉiuj kluboj en la respubliko estis senditaj salutleteroj kun instigo al vigla laboro. Tuj komenciĝis regulaj kunvenoj, kio tamen ne estis facila, ĉar Brno estis peze trafita de

la bombardado kaj bataloj, miloj da domoj estis en ruinoj. La Klubo tuj zorgis pri bona financa bazo kaj per donacoj estis akirite kelkdek miloj da kronoj. Ĉiu kunveno havis firman kulturalan programon, la programoj estis presitaj. Ankaŭ antaŭ la milito la klubkunvenoj ĉiam okazis kun programo, sed nur parole interkonsentitan kun unuopaj prelegontoj. La presitaj programoj havas grandegan avantaĝon. Aŭtune komenciĝis du kursoj en Lernejo de Laboro ĉe ÚRO (Revolucia Sindikata Movado), aperis multaj afiŝoj, flugfolioj, informiloj. La Klubo ekzorgis pri renovigo de la glora tradicio de la "Verda Stacio." Bedaŭrinde la radio-stacio de Brno estis tiom detruita pro la militsekvoj, por ĝia rekonstruo necesis tempo pli ol unujara kaj tial la rolon de la brna radio-stacio transprenis Prago. El Prago regule ĉiutage oni disaŭdigis gravajn aktualaĵojn el Ĉeĥoslovakio.

La plej gravaj entreprenoj de la Klubo en la jaro 1946 estis: modela kaj alloga libro-ekspozicio en librovendejo Komŭrka, sukcesa partopreno en la Tutŝtata Filatela Ekspozicio, prizorgado de 12 propagandaj vitrinoj, sukcesa kunlaboro kun Lernejo de Laboro ÚRO. En la jaro 1947 okazis ankoraŭ pli ampleksa ekspozicio de Esperanto-libro, en ĵurnaloj aperis pli ol 100 pagitaj anoncoj kaj informoj, en 11 kinejoj estis tutjara konstanta reklamo por Esperanto (bele ellaborita diapozitivo), kaj al ĵurnalo *Ĉin* estis almetitaj 10.000 informiloj. Samjare aranĝis la Klubo prelegojn de eminenta sveda sociala kaj poresperanta laborantino Anna Alamo el Stokholmo en aŭlo de Masaryk-Universitato (pli ol 400 aŭskultantoj, interpretis J. Vondroušek), sekvis plua prelego en kinejo Metro (700 studentoj kaj profesoroj, interpretis s-ano Josef Vítek el Prago kaj okaze de infan-soleno partoprenis kelkcent ĉeestantoj, tradukis ankaŭ s-ano J. Vítek). Plua publika prelego okazis en aŭditorio de Medicina Fakultato, prelegis D-ro A. Baur el Berno, interpretis s-ano Jiří Kořínek. Por ekspozicio "Verko de Petr Bezruč" havigis la klubo materialojn kaj aranĝis tien du grup-ekskursojn. Por rememorigi 60 jarojn de Esperanto estis eldonitaj grandaj artismaj afiŝoj en granda kvanto kaj distribuitaj laŭdezire al pluraj kluboj de nia respubliko (Prago, Liberec, Karlovy Vary, Olomouc k.a.). Krome estis eldonitaj kelkaj miloj da koloraj tre efikaj reklamiloj kaj estis aranĝite, ke ili estis videblaj en la urbo dum la tuta jaro.

En la jaro 1948 estis aranĝita koncerto de esperantisto Nuni Nanev, membro de Sofia Opero, unu el la plej famaj bulgaraj tenoristoj, plue estis aranĝita koncerto de glora kantistino M. Santreuil el Parizo, ankaŭ samideanino; partopreno en ambaŭ koncertoj estis po kelkcent personoj, aperis tre favoraj kritikoj pri ambaŭ artistoj kun same favoraj mencioj pri Esperanto. Plua ago: la Klubo akceptis pli ol 30 membran aŭtobusan karavanon el Danlando. Post trarigardo de la urbo sekvis vizito al Macoĥa kaj amika vespero kun la kultura programo, al kiu kontribuis ankaŭ la danaj gastoj. Fama skota poeto Rteto Rossetti vizitis la Klubon kun sia edzino en la jaro 1949, kaj denove post monro de la urbo sekvis ekskurso al Macoĥa kaj vespere amika kunveno kun programo kanta, muzika kaj recita. Plua karavano venis el Nederlando entute pli ol 50 personoj, nederlandanoj kaj belgoj. La karavanon akceptis prezidanto de la Centra Nacia Komitato k-do B. Ubr, kiu la partoprenantojn gvidis persone tra la urbodomo kaj decidis, ke la karavano estu gasto de urbo Brno, kaj ĉiu partopreninto ricevis luksan publikaĵon pri Ĉeĥoslovakio. Kompreneble ne mankis veturo al Macoĥa kaj kultura vespero. Merito de la Klubo estas *disdonigo* (toto slovo nemohu přečíst) de ekspozicio en Kroměříž "Cent jaroj de la ĉeĥa vivo en Kroměříž." Dek mil

prospektoj estis aldonitaj al revuo Esperanto kaj renkontiĝis kun granda internacia favora eĥo.

Memorinda entrepreno de la Klubo estis aranĝo de la VII-a Ĉeĥoslovaka Esperanto-Kongreso en Brno en la tagoj 27.-29. 5. 1950 sub honora patroneco de la Centra Nacia Komitato. Al la kongreso aliĝis 997 gesamideanoj, sed la partopreno superis 1100 homojn el ĉiuj lokoj de la respubliko. Programojn de la interkonatiĝa vespero kaj de la solena koncert-vespero oni povas nomi pioniraj agoj.

Famaj kantistoj kantis famajn oper-melodiojn kaj recitis plurajn verkojn. Artismajn tradukojn prizorgis la plej bonaj tradukantoj, Jiří Kořínek, Rudolf Hromada, Jindřich Ježek, D-ro J. Fousek, prof. Miloš Lukáš kaj D-ro Tomáš Pumpr. Programestro kaj piano-akompananto estis komponisto prof. Vilibald Scheiber. D-ro St. Kamarýt en la revuo Esperantista skribis pri la VIII-a kongreso en Brno: "Ĝi estis okazintaĵo edificanta ne nur pro la nombro de 988 kongresanoj, cifero ĝis nun neniam atingita, nek pro la granda nombro de junaj vizaĝoj inter ili, sed precipe, ĉar tiu ĉi kongreso esprimis manifestmaniere nian kompletan eniĝon en ĉeĥoslovakon publikan vivon, deklarante solene nian aliĝon al la porpaca batalfronto tutmonda. Per sia korporacia subskribo de la rezolucio el marto 1950 de la Stokholma kongreso de la pacdefendantoj ĝi proklamis nian pretecon batali organizite por la paco en tutmonda skalo. Dua grava pozitiva faro estas eniĝo de la Slovaka Esperanto-Societo en nian Asocion kiel memstara slovaka sekcio konservanta siajn titolojn kaj agadsferon. Ankaŭ tio ĉi signifas adaptiĝon al gvidaj linioj en nia publika vivo.

Programoj de la kongresaj Interkonatiĝa vespero kaj Koncerto estis faroj pioniraj. Aro da profesiaj aktoroj kun kelkaj altnivelaj amatoroj kantis kaj deklamis versojn ĉiam tre bone tradukitajn kaj adaptitajn por la kanto. Tradukoj estis liveritaj de R. Hromada, Jindřich Ježek, J. Kořínek, Miloš Lukáš, Tomáš Pumpr, St. Schulhof, Frant. Vaněk. Dum du danco-paŭzoj de la Interkonatiĝa vespero komenciĝis la longa programo per deklama ĥoro junulara el Ostrava, kantinta inter aliaj la faman junularan kanton "Budujeme" (Ni konstruas). Poste sekvis diversaj famaj popularaj kantoj de kabareta karaktero, kiujn prezentis Vanda Zitová (kun akordiono), kaj Frant. Crha kaj Rudolf Stolař (kun gitaro). Amatora duo Eva Suchardová kaj Valda Vinař prezentis en groteska komiko gajan scenon "Amo en proverboj". Malofte oni povis aŭdi tiom da bona lingvaĵo kantata kaj deklamata tiom bone dum rido kaj rideto tiom sinceraj. Je dispono estis 20 ciklostilitaj paĝoj de ĉi tiuj memorindaj tekstoj.

La koncerto dimanĉa estis de serioza karaktero. La samaj tradukantoj liveris al la kantistoj tekstojn de famaj melodioj konĉertaj kaj operaj. La kongresanoj ricevis ilin en 16 paĝa presita kajero. Deklamis Švábíková-Kožíková Fibich-melodramon "Nikso" (pianon ludis D-ro Hromádka kaj Vl. Leraus deklamis "Fratecon" de Sv. Čech kaj "Raporton" de Šrámek. Kantis Věra Borská, Eliška Kalousová, D-ro J. Hromádka, prof. J. Válka. Estas malfacile el ĉi tiu programo kantita kaj majstre deklamita citi tiun aŭ alian programeron kiel pli elstaran ol la ceteraj. Sed nepre ni devas citi profesoron Vilibald Scheiber, kiu estis kompilinto kaj nuzika gvidinto de la programoj kaj fortepiane akompanis la kantojn en tiu mirinda entrepreno. Ĉiuj rolintoj meritas gratulojn kaj dankojn, sed li tute apartan, pro sia sindediĉo al la muzika arto kaj al Esperanto same.

Organizo de la kongreso kontentigis tre multajn kongresanojn, plendoj preskaŭ

ne estis diritaj, ĝenerale oni laŭdis pretecon de la Loka Kongresa Komitato, kiu sukcesis prepari kongreson tiom imponan en tempo tre mallonga. Ĝia konsisto estis la sekvanta: prezidanto: Josef Friedrich, sekretarioj: Josef Vondroušek, Milada Vondroušková, Marie Adamcová, kasisto: Tomáš Borkovec, membroj: Jiří Kořínek, Vilibald Scheiber, Věra Borská, Stanislav Sedlák, Rudolf Nečas, Frant. Vyskočil, Frant. Frýbert.

Ekskursojn al Macoĥa preparis kaj gvidis St. Sedlák kaj R. Nečas. Per du aŭtobusoj partoprenis 112 personoj kaj per trajno 90 personoj (gvidis K. Rambousek). Ekskurson al Bystrc (digolago) gvidis J. Jílek, partoprenis 190 personoj.

Venis 10 salutleteroj kaj telegramoj el eksterlando (UEA en Londono, Espersnto-Asocio en Pollando, Aŭstria-Esperanto-Federacio, Brita Esperanto-Asocio, Belga Ligo, Germana Esperanto-Asocio, Esperanto-Societo ĉe Sorbono, kiu samtempe jubileis, Internacia Komerca Asocio en Hago, Brita Esperanto-Kongreso) kaj el nia lando, inter ili Slovakotour en Trenčín kaj maljunaj pioniroj Ĉejka kaj Šupichová, sume 15.

La kongreson alparolis L. Gregor el ministerio pri informoj kaj JUC. I. Havaš el Komisiitejo por informoj kaj klerigo en Bratislavo, en nomo de la Nacia Fronto alparolis la kongreson reprezentantoj de Partio de Ĉs. Socialistoj, delegito de Ĉs. Partio Popola, Reprezentanto de Revolucia Sindikata Movado kaj reprezentanto de urba garnizono. Ĉeestantaj eksterlandaj esperantistoj s-ro J. E. Bruin el Nederlando kaj s-ino D-ino E. Hein el Aŭstrio amike salutis la kongreson.

Stalin-tezoj pri la lingvoscienco kaŭzis malfavoran sintenon de la partiaj instancoj al Esperanto, la internacia lingvo fariĝis nedezirata, ekde la jaro 1949 estis la Klubo sub polica inspekto, okazis pluraj enketadoj ĉe la ŝtata polico, aperis diversaj malfacilaĵoj, ekz. la kursoj ne darfis esti afiŝataj kaj venis pluraj rekomendoj al malfondo de la Klubo. La situacio ŝanĝiĝis ĉ. la jaro 1956. Dum en Pollando, Jugoslavio, Bulgario kaj Popola Ĉinio la movado prosperis kaj havis konsiderindajn sukcesojn.

La Klubo neniam rezignis je la agado, ne atentis rekomendojn, neniam estis perdita iu sezono por la kursoj. Ili daŭre kaj persiste ĉiujare okazis.

Aŭtune en la jaro 1951 estis aranĝita granda ekspozicio de la internacia lingvo en kadro de Ekspoziciaj Foiroj de Brno, en la rotondo. Modela faka instalado sub gvido de arkitekto kaj pluraj helpantoj, kosto de la entrepreno Kĉs 10.000,-.

La 17.-18.11. 1951 solenis la Klubo 50 jarojn de sia ekzistado. Ĝi estis evento de granda signifo. Por la soleno ne estis farita speciala reklamo, male ĝi estis intence limigita. Nome pro nuligo de pluraj hotelaj loĝebloj estis tre malgranda. Okaze de la VIII-a Ĉs. Esperanto-Kongreso en la jaro 1950 kapacito de hoteloj tute ne sufiĉis; dekoj da partoprenantoj tranoktis en banĉambroj de bandomoj. Kunvenis pli ol 200 partoprenantoj el multaj lokoj de la respubliko, venis nestoro de la movado, aŭtoro kaj eldoninto de la unuaj lernolibroj kaj gazetoj en la ĉeĥaj landoj lernejestro Theodor Ĉejka el Bystřice pod Hostýnem, inter la partoprenantoj estis instruisto Josef Zábaj, kiu jam en la jaro 1900 gvidis en Brno kaj antaŭurboj la unuajn kursojn de la internacia lingvo.

"Amika vespero estis kun kantoj kaj deklamado. Ĥoro de la kluba junularo kantis popolajn kantojn (en traduko de Pumpr, Filip, Chlubnová), M. Adamcová legis

ĉapitron el "Raportaĵo skribita sub pendumila ŝnuro" tradukitan de R. Hromada, Eva Suchardová deklamis sian poemon "Letero el malsanulejo" kaj de F. Šrámek "En pluva tago aŭtuna" tradukitan de R. Hromada. L. Kovář legis la duan kanton el Bapto de caro Vladimiro tradukitan de D-ro St. Kamaryt, St. Fröhlich deklamis poemon de Mickiewicz "Vojevodo", tradukitan de Grabowski. Trio el la Junularo legis "Morto de Arĥimedo" el la Libro de Apokrifoj de K. Čapek en traduko de J. Vondroušek. S-ino Orlová kantis rusajn popolajn kantojn, Frant. Crha kantis Poem de Fibich en traduko de R. Hromada kaj "Kantas mi al mia lando" de Petzný kaj "Gardo ĉe Volgo" de Lehár, ambaŭ tradukitaj de J. Kořínek. Míla Režná kantis arion de Najado en traduko de Pumpr kaj kune kun F. Crha dueton "Amo, juna amo" en Pumpr-traduko.

Solena kunveno estis inaŭgurita dimanĉe je la 10-a per kanto de la himno. Poste prezidanto de la Klubo J. Vondroušek prezentis historion de la Klubo, skizante periodojn de ĝia aktiveco kaj interrompoj de la kluba vivo pro la mondmilitoj. Lia prelego estis edifanta pro la kolektita materialo kaj pro la prezento same. Poste alparolis la kunvenon Th. Čejka, rakontante pri komencoj de sia agado. Th. Kilian poste legis lian artikolon pri kunlaborado kun Krumpholz. Sekvis mallonga parolo de D-ro St. Kamaryt pri signifo de kontinueco en nia movado, kaj pri meritoj, kiujn akiris prezidanto Vondroušek pro sia persistemo, R. Hromada parolis pri signifaj akiraĵoj dum la kvindek jaroj, D-ro Aug. Pitlík pri komencoj de la movado antaŭ kvindek jaroj, Jaroslav Šustr en nomo de EK Prago, kiu festos la saman datrevenon post unu jaro, V. Špŭr en nomo de Kolegio en Doksy. D. Chlubnová dankis al prez. Vondroušek pro lia sindediĉo al la klubaj laboroj dum longa vico da jaroj. Du delegitoj el Olomouc alportis al li bildon, kiel donacon de tiea klubo.

Sekvis altnivela koncerto de profesiaj artistoj. Profesoro Vilibald Scheiber kaj Alena Horáková prezentis piane kvarmane Marŝon el la simfonia poemo Volha de Scheiber, La Fidemon kaj la Ringon el Moraviaj duetoj de Dvořák kaj Slavan Dancon n-ro 1 de Dvořák. Věra Borská kantis arion de Roza el opero "Sekreto", "Ho, diru" de Mozart, "Nova ĝojo, nova timo" el la "Geedziĝo de Figaro", kaj "Knabino, mia roza flor" de Fibich. Václav Kvarda kantis arion de Přemysl "Ho, tilioj" el opero "Libuše" kaj "Sub arbust' de rozo kampa" de Vítězslav Novák. E. Suchardová deklamis poemon de Viktor Dyk "Patrujo parolas" kaj "Romanco pri Karolo la IV-a" de Jan Neruda. La tradukoj de la kantoj estis plejparte de J. Kořínek, R. Hromada kaj D-ro Pumpr. La poemo de J. Neruda estis tradukita de profesoro Miloš Lukáš, tiu de Dyk kolektive de Kořínek, Pumpr, Hromada. D. Chlubnová recitis poemon "Lenin" de Majakovskij. En ambaŭ koncertoj pianakompanis prof. V. Scheiber.

En la koncerto sabata rolis plejparte amatoroj, en tiu dimanĉa profesiaj artistoj. Ambaŭ havis tre altan nivelon. Tio estas sperto konata ĉe tiaspecaj entreprenoj en Brno. Prof. V. Scheiber, piano-virtuozo, respondeca pro parto muzika kaj J. Kořínek pro la esperantlingvaj tekstoj, ricevu admiran gratulon. Kun prof. Scheiber pianoludis nova samideanino Alena Horáková, profesorino en muzika lernejo; ŝi estu salutita pro sia arto kaj kiel nova rolantino en niaj programoj. Kaj la konataj kanto-majstroj Borská, Kvarda, Crha, Režná, Orlová akceptu nian dankon pro sia daŭra kunlaborado. Sed pro la jubilea karaktero de la entrepreno ni turnu nian atenton al la esperantlingvaj tekstoj de la du koncertoj. Ilia bona kvalito estas okulfrapa fenomeno, des pli grava, ĉar temas pri tekstoj de kantoj kaj poemoj malfacile tradukeblaj. Kiam

ni aŭdis tiom longan vicon de poeziaj tekstoj, ni ne povas ne emfazi iliajn elstarajn kvalitojn. Tiuj bonaj tekstoj evidente helpas al la deklamantoj kaj kantantoj. Multaj el la kantoj estas de J. Kořínek, nova adepto de nia lingvo kaj nova aŭtoro de kanto-tekstoj, kies kvalitoj daŭre kreskas. Sed ni enskribu ĉi tie du programerojn: Longa ĉapitro el Fuĉik-raportaĵo, legita de M. Adamcová, katenis dum la tuta prezento pro la traduklingvaĵo kaj pro la legado same. Kaj la glora Dyk-poemo "Patrujo parolas" deklamita de E. Suchardová en traduko kolektive farita de Kořínek, Pumpr, Hromada estis sperto ekster serio. La poemo de Dyk konsistas el koncizaj parolturnoj kaj nekutimaj rimoj kaj efikas konsternite ofte pro la nura rimo. La tradukintoj sukcesis mirinde imiti la stilon kaj la deklamantino prezentis la poeman kun neordinara efiko. El revuo "Esperantista."

En la jaro 1951 transiris la Klubo, laŭ la leĝo pri organizoj, kiel interes-rondeto, al Kleriga Akademio Komenský, poste al Kleriga Kunularo de urbo Brno kaj fine al Parko de Kulturo kaj Ripozo en Brno. En la unuaj jaroj nia agado estis sekvata kun konstanta malkonfido. Nur en la postaj jaroj kreigis kunlaboro tre bona, nia laboro renkontigis kun kompreno, intereso kaj helpo. Tiu helpo konsistis ankaŭ el paŭŝalo, ejoj por kursoj kaj kunvenoj, senpaga multigado de niaj Bultenoj kaj Programoj. Nepre menciinda estas firma apogo tiuflanke de s-ino Věra Havlišová, gvidantino de klubaj agadoj en PKR.

Fine de la jaro 1951 ministerio de irformoj reorganizis eldonadon de la gazetoj. Centoj da gazetoj estis ĉesigitaj, inter ili ĉiuj tri Esperanto-gazetoj en Ĉeĥoslovakio. Sekvis likvido de Esperanto-Asocio en ĈSR. Volante eviti perdojn de la membraro kaj la desorganizon, decidiĝis la klubo eldonadi ekde la jaro 1952 Bultenon. Per informado el la enlanda kaj eksterlanda movadoj, per inforoj plejparte aktualaj, interesaj kaj laŭokaze gravaj la Klubo volis konservi elanon inter sia anaro kaj ĝian fidelecon al la internacia lingvo. Fakte, dank' al nia Bulteno la anaro estis sisteme informata pri ĉio, kio koncernis nian movadon kaj vicoj konstante kreskis de jaro al jaro. Jare estis eldonataj 5-6 n-roj, plejparte dupaĝaj, sed ankaŭ, ne malofte kvarpaĝaj. Eldonkvanto 550 ekz. Bulteno estis opiniata nur transira periodaĵo, loka, ĉar firme ni kredis rekonstitucion de la tutŝtata organizo kun revuo, kia estis iama Esperantista.

En la j. 1952 honoris nian Klubon tiama ĝenerala sekretario de UEA universitata profesoro D-ro Ivo Lapenna per letero, en kiu inter alie estis skribite: ". . se ekzistus en la mondo almenaŭ 30 kluboj, kiel via, la movado aspektus tute alie."

Meritas noti la jenan okazaĵon. En 1 jaro 1955 venis al Brno prof. Canko Murgin el Sofio. Lia deziro estis renkontiĝi ankaŭ kun rektoro de universitato prof. D-ro F. Trávníček, kiu plurfoje atakis Esperanton en ĵurnaloj. Liaj artikoloj estis rebatitaj, ĉar al la redakcio de Lidové noviny venis centoj da leteroj, kaj sinjoro rektoro Trávníček reagis ilin, cedante iom en siaj postaj artikoloj, sed lia kulpigo pri "kosmopolitismo" estis danĝera kaj neforviŝebla, per ĝi estis markita la tuta movado. La aŭdiencon ĉe la sinjoro rektoro aranĝis D-ro J. Šikula. Kun prof. Canko Murgin iris ankaŭ la skribinto de la raporto. Post formalaj estigis debato, eĉ sufiĉe akra. Tamen ni sukcesis informi rektoron Trávníček pri la movado, refuti liajn antaŭjuĝojn kaj missciojn kaj speciale informi lin pri kelkaj notindaĵoj en Ĉeĥoslovakio rilate Esperanton (ekz. ke prezidento K. Gottwald mem rekomendis al oficistino en la praga

kastelo fiksi sur pordon de ŝia oficejo surskribon "Esperanto parolata", ke ĉefo de la Revolucia Sindikata Movado, posta prezidento Ant. Zápotocký mem subskribis la peticion favore al Esperanto por la Unuiĝintaj Nacioj); li deklaris, ke li havas nenion kontraŭ Esperanto kaj komprenigis al ni, ke malgraŭ diversflanke ripetitaj postuloj, plu skribi kontraŭ la internacia lingvo, li ne akceptis tion kaj kun deziroj de sukcesoj al nia laboro finiĝis la kunveno.

Pasis jaroj 1952-1955. La klubkunvenoj estis bone vizitataj kaj regulaj dum la tuta jaro, ankaŭ en la someraj monatoj, kun programoj klerigaj kaj kulturaj. Al programoj estis dediĉita granda atento. Ĉiujare dufoje okazis solenaj koncertoj preparitaj kaj gviditaj de s-no prof. V. Scheiber.

Ekspozicio "70 jaroj de Esperanto" estis aranĝita en granda halo de Art-Industria Muzeo ekde la 13.-30.10.1957. Estis ekspoziciataj ĉ. 300 libroj, ĉefverkoj de la mondliteraturo, dekoj da reprezentaj Esperanto-revuoj, kelkaj en kompleta jarkolekto, centoj da plej allogaj esperantlingvaj prospektoj, afiŝoj de Unesko, dekoj da afiŝoj kaj pluraj spritaj desegnaĵoj faritaj de inĝ. Jan Werner. Sed la plej grava: la ekspozicio estis instalita de arkitekto J. Smečka, kiu kompletigis ĉion per konvenaj tekstoj. Dum la tuta tempo membroj de la klubo alterne deĵoris tutajn tagojn. Inaŭguris ĝin direktoro de Kleriga Kunularo sinjoro Špička, festparolis s-ano J. Vondrouek. La ekspozicion vizitis ĉ. 4000 homoj kaj ĝi renkontiĝis kun simpatia eĥo kiel ĉe la publiko tiel en la preso.

Aŭtune 1956 vizitis la klubon kara gasto: Julio Baghy kun sekretario Lajos Mathon. Okazis speciala kunveno, kun multnombra vizito, en kiu Baghy rave prezentis siajn poeziajn verkojn. La sekvintan tagon prezentis la karaj gastoj du hungarajn kulturfilmojn en Esperanto. Ambaŭ vesperoj apartenas al la neforgeseblaj, Baghy nur brilis per elano kaj sprito. Plua gasto estis el popola Ĉinio, sekretario de Ĉina Esperanto-Ligo.

Pli grava vizito venis somere 1958 el Svislando; denove konatigo de la gastoj kun la urbo, ekskurso al Macoĥa kaj belega folkloro vespero, kiun prezentis anoj d Slovaka Rondeto en la naciaj kostumoj kaj dancoj kun zimbazona muziko.

Ekde la jaro 1958 eldonas Internacia Foiro en Brno ĉiujare unu numeron de la foira bulteno en la internacia lingvo, laŭ instigo de la Klubo, kiu prizorgas ne nur la tradukon, sed ankaŭ ekspedon al pluraj centoj da adresoj en la tuta mondo. La deka numero de la foira bulteno en la jaro 1968 aperis jam prese kaj ilustrita. Malgraŭ klopodoj flanke de la Klubo, ekde tiu jaro ne plu estis atingita la antaŭa stato, plua numero ne aperis, kvankam la spertoj kun la esperantlingvaj bultenoj estis tre bonaj, mem la direktoraro de la Foiro konvinkiĝis pri tio, kaj gvidantoj de pluraj standoj kaj reprezentantoj de gravaj firmoj ĉe la Foiro estis esperantistoj.

Publikaj prelegoj en la jaro 1959 al la centa datreveno de d-ro L.L. Zamenhof okazis en salono de Parko de Kulturo kaj en la jaro 1960 en la Ŝtata Ŝparbanko antaŭ tricent okupitoj. En ambaŭ parolis J. Vondroušek.

Kaj proksimiĝis nova jubileo. La 25-an kaj 26-an de novembro festis la Klubo sian 60-jaran ekzistadon. En salono de T.J. Spartak kunvenis sabate ĉ. 200 gesamideanoj el Brno kaj pluraj el diversaj lokoj de nia respubliko al amika vespero kun riĉa kaj artisma programo. En la unua parto ĥoro ĉe Konservatorio kaj solistinoj

O. Dvořáková kaj J. Ceriřerová rave prezentis ses Moraviajn Dutetojn de Ant. Dvořák, la Ukrainian Kanton de J.B. Foerster kaj dek popolajn kantojn sub gvido de prof. U. Scheiber. La kantotekstojn liveris en perfekta traduko J. Kořínek. En la dua parto de la programo prezentiĝis teatra kolektivo de la Klubo sub reĝisorado de M. Adamcová per tri ĉarmaj unuaktaĵoj kaj rikoltis longan admiran aplaŭdon. Rolis: D. Konecká, M. Lorková, V. Podhradská, R. Tomková, Z. Vaverková, A. Bednařík, M. Dvořák, J. Horký, J. Kalina, I. Petřík.

La dimanĉa solena matineo en la sama salono estis ree kultur-artisma evento. Post himnoj kaj bonvenigo fare de vicprezidanto J. Friedrich, prez. de la Klubo J. Vondroušek skizis per elokventaj vortoj la sesdekjaran historion de Esperantista Klubo en Brno, en kiu ne mankis faroj kaj atingajoj gloraj kaj rimarkindaj. Inter alparoloj de la gastoj ekbrilis tre inica parolado de prof. Th. Kilian el Třebíč, multjara honora membro de la Klubo. En la sakvinta artprogramo prezentis membroj de Janáček-Operejo famajn ariojn, dutetojn kaj kantojn da traduko de niaj plej kompetentaj fakuloj. Aŭskultantoj de Brna Konservatorio kompletigis la altnivelan programon per violon- kaj pianosoloj. Pri tiu digna soleno meritiĝis denove nia sindona prof. V. Scheiber, kiu preparis, enstudigis kaj gvidis ambaŭ programojn. Por multjara meritplena laboro disdonis prez. de la Klubo honorajn diplomojn al la jenaj gesamideanoj: M. Adamcová, M. Lorková, T. Borkovec, J. Friedrich, J. Kořínek, V. Scheiber kaj d-ro J. Šikula.

Laŭ invito de la Klubo denove venis la 18.5.1963 la fama poeto kaj verkisto Julio Baghy en nian urbon. La 20.5. okazis eksterordinara kunveno, en kiu la kara gasto skizis evoluon de la internacia lingvo ekde projekto kaj artefaritaĵo ĝis lingvo plene vivanta, agnoskata kultura faktoro en la moderna vivo kaj internaciaj rilatoj, poezia lingvo, inspiranta poetojn kaj verkistojn al artisma kreado. Poste li prezentis en senkompara maniero plurajn siajn poemojn kaj novelojn, kiujn la multnombre ĉeestanta samideanaro akceptis kun ĉiam pli kreskanta entuziasmo.

La 30.5. parolis en granda salono de la Parko en Brno d-ro inĝ. J. Šikula je la temo: La internacia lingvo en scienco.

Laŭ sugesto de la Klubo eldonis la Parko 12 paĝan ilustritan broŝuron ĉe Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj, Arkeologia Instituto en Brno, sub titolo "Granda Moravio" en Esperanto. Tradukis kaj dissendon de 3 000 ekz. prizorgis la prezidanto. Pri la publikaĵo estis granda intereso, alsendon petis (en Esperanto) dana kaj nederlanda ambasadoroj. Karavanon de 35 gesamideanoj el Belgio, Anglio, Francio kaj Nederlando akceptis la Klubo kaj kondukis al la ekspozicio Granda Moravio.

En la Universitata Biblioteko okazis ekspozicio de ekskluzive sciencaj libroj en la internacia lingvo. La ekspozicio daŭris du semajnojn kaj renkontiĝis kun konstanta intereso de multaj vizitantoj. La 25.3. prelegis d-ro J. Šikula samloke pri problemoj de la internacia lingvo en scienco antaŭ ĉ. 20 sciencaj laborantoj.

Ekspozicio de Esperanto-Libro en la tagoj 26.9.-10.10.1965 en Freska Salono de la Malnova Urbodomo estis treege sukcesa. Estis ekspoziciataj la plej gravaj verkoj de la tutmonda literaturo, ankaŭ laŭfakaj, gazetoj, prospektoj de mondfirmoj, turismaj prospektoj de urboj, banlokoj, afiŝoj ktp. La materialojn, afiŝojn, librojn ktp. liveris la Klubo, aranĝon faris arkitektoj de la Parko, la ekspozicio estis vere reprezenta laŭ la prezentita materialo kaj aspekto. Flor-ornamon prizorgis d-ro J.

Ŝikula. En nomo de Ĉs. Esperanto-Komitato inaŭguris d-ro J. Ŝikula, en nomoj de la Parko kaj Klubo parolis J. Vondroušek. La ekspozicion vizitis pli ol 1200 homoj, kaj gesamideanoj (hazardaj vizitantoj de la urbo) el Sardinio, Jugoslavio, Pollando, Hungario kaj Germanio. Ankaŭ franca grupo (neesperantista).

Bondeziro, kiun sendis al nia Klubo okaze de la nova jaro 1966 J. Baghy, grave malsana, el budapeŝta hospitalo:

Sude palmoj, norde pinoj
nian teron pompe vestas,
sed egale en animoj
Novan Jaron oni festas.
En la mondo pac-rubando
ligu landon al la lando,
ĉiu kara samcelano
ivu bone kaj en sano!

Estis kolektitaj 14 mil kolektivaj subskriboj kaj 1200 individuaj por la Peticio favore al Esperanto por UNO.

En majo 1966 okazis en la Klubo prelego de s-anino prof. Vesna Skaljer-Race el Beogrado. Estis prezentitaj multaj diapozitivaj, surbendigitaj kantoj, kelkaj filmoj. Kaj multaj simpatioj manifestiĝis.

Samjare akceptis la Klubo ĉ. 110 membran karavanon de italoj, belgoj, nederlandanoj, francoj, danoj kaj usonanoj. Sekvis kora akcepto, trarigardo de la urbo kaj amika kunestado.

Komence de aŭtuno estis dissendita speciala inform-letero pri la internacia lingvo el ĉ. 150 mezlernejoj, altlernejoj kaj faklernejoj.

La 25.5.-26.5.1968 okazis en Brno la Kvara Tutŝtata Konferenco de Esperanto-Junularo en kunlaboro kun la Junulara Sekcio de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato kaj Klubo de Junaj Vojaĝantoj en Brno. La konferenco tre sukcesis, ĉeestis ĉ. 100 gejunuloj, okazis amika vespero kun teatra programo kaj danco, kaj ekskurso al Macoĥa. Organizis J. Adamec, F. Adamec, J. Kolejka.

Unuaranga evento por la tuta movado en nia respubliko estis aranĝo de la Konstitua Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Brno en la tagoj 29. kaj 30. de marto 1969. Post aprobo de la statuto de ĈEA fare de la Ĉeĥa Ministerio de Interno estis la Klubo komisiita pri aranĝo de la kongreso. Akceptado de aliĝiloj estis limigita je unu monato, por la preparlaboroj restis eĉ ne du monatoj. Tamen la kongreson partoprenis pli ol 400 gesamideanoj. Honoran patronecon akceptis Lerneja Komitato de la Urba Nacia Komitato, plue Parko de Kulturo kaj ripozo en Brno kaj Kleriga Instituto de Prago.

Interkonatiĝa vespero okazis en granda salono de hotelo Slovan. La salono estis plenega, regis gaja kaj amika etoso.

Sabate la 29.3.1969 estis inaŭgurita la Konstitua Kongreso de ĈEA en granda halo de Besední dŭm. La ĉeestantaron alparolis prez. de la Loka Kongresa Komitato kaj estro de la Klubo J. Vondroušek. Salutparolojn prezentis oficialaj gastoj, inter ili reprezentanto de Ĉeĥa Ministerio de Kulturo, direktoro de Kleriga Instituto de Prago

d-ro Miroslav Bukovský, sekciestro de la Urba Nacia Komitato en Brno Václav Pazourek kaj direktoro de Parko de Kulturo kaj Ripozo en Brno Vladimír Stein. Leteron de prezidanto de UEA prof. d-ro Ivo Lapenna tralegis oficiala reprezentanto de UEA s-ano Mikuláš Nevan. La kongreso aparte kore bonvenigis vortojn de Pavol Rosa, reprezentanto el Slovakio, kiu parolis en nomoj de Kleriga Instituto en Bratislava, Preparkomitato de Asocio de Esperantistoj de Slovakio kaj Slovaka Esperantista Societo ĉe akademio de Sciencoj. La partoprenintoj aŭskultis paroladon de s-ano inĝ. F. Sviták, prezidanto de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato kaj de s-ano Josef Vitek, proponita prezidanto de ĈEA. La kongreso aprobis la statuton de ĈEA kaj elektis Centran Komitaton de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Tiel estis fondita Ĉeĥoslovaka Esperanto-Asocio kaj per ĝi eniĝis nia movado inter la ceterajn Esperanto-organizojn.

Vespere en la sama salono okazis grandioza solena koncerto, preparita de prof. V. Scheiber. Kantis famaj membroj de Janáček-Operejo, sekvis recito de glora poemo de R. Kipling fare de s-anino aktorino Alena Růžičková-Pavlinová kaj sekvis brila violon-koncerto. Dimanĉe la 30.3. daŭrigis la traktadoj de la kongreso kaj okazis kunsidoj de kelkaj sekcioj. La kongreso atribuis al dek meritplenaj esperantistoj titolon "Honora membro de ĈEA". Jen ili: A. Bárachová, d-ro J. Fousek, Th. Kilian, J. Kořínek, M. Lukáš, d-ro T. Pumpr, F. Pytloun, V. Scheiber, J. Šupichová, J. Šustr. En la ferma parto de la kongreso estis tralegita kaj unuanime akceptita Program-Deklaro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

La kongreso estis modele organizita, ne estis mankoj. Grandaj afiŝoj anoncis al la brna loĝantaro okazon de la kongreso, eĥo en aro da ĵurnaloj estis tre bona. Konsisto de la Loka Kongresa Komitato: prez. J. Vondroušek, vicprez. d-ro J. Šikula, sekretarioj inĝ. J. Werner, Milada Vondroušková, kasistino M. Lorková.

En septembro venis al Brno pli ol 60-membra karavano de italaj esperantistoj, revenantaj el Universala Kongreso de Esperanto en Helsinki. Post trarigardo de la urbo kunvenis kun ili kelkdek brnaj gesamideanoj en amika kunesto.

La 5.9. prelegis en eksterordinara kluba kunveno s-ino E. Krusse el Frankfurto s. M. pri Internacia Kongreso de fervojistoj-Esperantistoj en Avinjono. La prelego estis akompanata per pluraj diapozitivoj.

En Konsum-Kooperativo Jednota prelegis la 29.9. s-ano Eizo Ito el Kioto pri la vivo de la japana popolo, tradicia kaj moderna. Grandan partoprenon de la okupitoj ebligis la estraro de la kooperativo. Post la prelego multaj demandoj, vigla debato. La diapozitivoj, multaj, tre plaĉis. Tradukis la prezidanto. La sekvintan tagon aŭskultis la prelegon de s-ano E. Ito pli ol 100 anoj de la Klubo.

Ekde oktobro 1969 anoncas la Klubo kursojn de la internacia lingvo per propraj afiŝoj. Dum la jaroj 1952-1969 kursoj de Esperanto povis esti menciitaj nur sur komuna afiŝo por pluraj kursoj lingvaj, kuirarto ktp. En la jaroj 1971 kaj 1972 estis eldonitaj grandformataj afiŝoj, el grafika vidpunkto neordinare efikaj.

En februara ĝenerala kunveno de la Klubo en 1970 demetis la ĝisnuna prez. J. Vondroušek sian funkcion, post preskaŭ 25-jara prezidanteco, por povi plene sin dediĉi al la gazetara servo kaj specialaj taskoj de la Klubo. Nova prezidanto estis elektita s-ano inĝ. ark. Jan Werner, sekretario Zdeněk Hršel. La ĝenerala kunveno elektis s-anon J. Vondroušek honora prezidanto. Plue estis elektitaj honoraj membroj

la jenaj gesamideanoj: M. Adamcová, T. Borkovec, R. Kaplerová, R. Nečas, O. Petr, V. Scheiber. La antaŭaj honoraj membroj: prof. inĝ. V. Kroužil, prof. kaj direktoro de sanitara lernejo Th. Kilian el Třebíč.

Grava revuo Věda a život (Scienco kaj vivo) alportis en la 6-a kaj 7-a n-roj ampleksan objektivan studon kaj analizon de Esperanto el plumo de universitata profesoro fil. d-ro Arnošt Lamprecht kaj d-ro Miroslav Čejka.

Por informo de la publiko estis dissenditaj 3000 informiloj, eldonitaj de ĈEA. Tekston ellaboris s-anoj Z. Hršel kaj inĝ. J. Werner, grafikan aranĝon same inĝ. J. Werner. La informiloj estas daŭre dissendataj.

Okaze de la ĝenerala kunveno 1971 rezignis inĝ. J. Werner je la prezidanta funkcio kaj pri la ĝusta funkciado de la Klubo responsas ĝis elekto de nova prezidanto: inĝ. J. Werner, d-ro inĝ. J. Šikula, Z. Hršel.

La Klubo disponas pri du inform-vitrinoj (ĉiuj ceteraj estis en la j. 1949 forigitaj laŭ supera ordono). La stacidoman vitrinon prizorgas s-anino M. Vondroušková.

Gazetara servo, instalita en la jaro 1971, formas gravan parton de la kluba aktiveco. Dum la lastaj tri jaroj estis senditaj al ĵurnaloj de Brno centoj da inform-artikoloj kaj noticoj, kaj eĉ se nur malgranda parto estas publikigita, tamen informoj el la movado aperas relative ofte. Krome okazis kelkaj intervjuoj en la radio. (Z. Hršel, J. Vondroušek). La gazetaran servon prizorgas J. Vondroušek.

Kaj denove venis grava kluba jubileo. En la tagoj 11.-13. de junio 1971 Esperantista Klubo ĉe Parko de Kulturo kaj Ripozo en Brno kaj Esperanto-Rondeto ĉe la Unua Brna Maŝinfabriko en Brno komune solenis la kluban jubileon de 70 jaroj. La programo estis vere riĉa. Vendrede la 11.6. okazis en la poezia vinejo MÚZA vespero de Esperanta Poezio "Eterna Bukedo." Specimenojn de tradukita poezio (ĉeĥa, angla, slovaka, germana, rusa, ĉina k.a.) kaj de originala poezio prezentis aktorinoj Alena Růžičková-Pavlinová kaj Aranka Lapešová kun niaj aninoj Marta Lorková kaj Olga Valentová. Kantojn prezentis Miroslav Smyčka el Ústí n. L., membro de la tiea operejo, pian-akompanis D. Zaorálková. La vespero vekis merititan intereson ankaŭ en la neesperantista publiko. Sabata antaŭtagmezo en granda halo de hotelo Slovan estis dediĉita unue al solena kunsido kun fest- kaj salutparoloj. I.a. parolis s-ano inĝ. F. Sviták el Prago por ĈEA kaj plue aro da reprezentantoj de pluraj Esperanto-Kluboj. Inter multaj salutleteroj venis sola eksterlanda el Sovet-Unio, de Interklub en Doneck. Reprezentantoj de la Parko kaj Kluboj aranĝis laŭmeritan honorigon al s-ano J. Vondroušek, al s-aninoj A. Růžičková-Pavlinová, iniciatemo en la kultura vivo urba kaj kluba, kaj al s-anino Růžena Kaplerová, malnova bibliotekistino. La historion de la Klubo prezentis en sia ĉefparolado J. Vondroušek. Sekvis koncerta Matineo sub gvido kaj piano-akompano de prof. V. Scheiber. Kantojn kaj ariojn de la ĉeĥaj komponistoj (Smetana, Dvořák, Janáček, Novák kaj Křička) prezentis artistoj Helena Supová-Halířová, V. Dronská, F. Chudoba, M. Smyčka (en tradukoj de J. Kořínek, M. Lukáš, T. Pumpr). Ili rikoltis tondran aplaudon, ilia prezento elvokis ĉe la partoprenantoj solenan etoson. Sabata posttagmezo kaj dimanĉa antaŭtagmezo apartenis al konferenco pri historio de Esperanto-movado sur teritorio de Ĉeĥoslovakio, unua tia aranĝo. Prelegojn prezentis prof. J. Cink, V. Echtner, J. Mařík, inĝ. F. Sviták, prof. E.V. Tvarožek, RNDr. V.

Novobilský. Sabate vespere okazis amuza vespero kun danco. La jubileo salutis per poemoj M. Jakubcová, J. Kořínek. Ĉiuj partoj de la solena kaj labora programoj estis bone preparitaj kaj altnivelaj.

Informojn pri 70 jaroj de la Klubo alportis lumĵurnalo kaj la radio, kiu disaŭdigis 20 minutan prelegon pri la movado kaj la Klubo, preparitan de J. Vondroušek. Ankaŭ pluraj ĵurnaloj alportis informojn pri la jubileo kaj pri agdo de la Klubo. La solenojn digne preparis prez. de la preparkonitato inĝ. ark. J. Werner, Z. Hršel k.a. Post fino de la solenoj konsentis s-ano J. Vondroušek akcepti la prezidantecon ĝis fino de la jaro.

Necesas iom pli detale skribi pri la klubkunvenoj. Ili okazis ĉiam regule, senescepte, ekde junio 1945, ankaŭ dum la someraj monatoj. Programoj estis en la unuaj jaroj presataj, poste multobligitaj, preparataj ĉiam por kvar monatoj, kun enhavo kultura kaj kleriga. Gvidilo por kunmetado de la programoj estas Kultura kaj Politika Kalendaro. Tiel estas eble atenti naciajn kaj mondajn jubileojn, kulturajn k.a. eventojn. La prelegoj koncernas ĉiujn fakojn, biorafion, biologion, literaturon, teknikon, historion, geografion, muzikon, astronomion kaj ofte estas akompanataj per diapozitivaj. Al la programoj estas dediĉata granda atento, pluraj prelegoj estas oratoraj. Por la prelegoj ofte estas invitataj eminentaj s-anoj el la tuta respubliko. Ofta parolanto estis R. Hromada, prof. Th. Kilian, d-ro St. Kamaryt, J. Šustr kaj multaj aliaj. Okazas filmvesperoj, speciale estas projekciataj Esperanto-filmoj, okazis pluraj maskobaloj, vizititaj el multaj lokoj de nia lando, amuzaj kaj amikaj vesperoj kun art-programo. La programoj celas esti speco de ia vespera universitato.

Okazis dekoj da Teatraj vesperoj sub reĝisorado de M. Adamcová. Estis prezentitaj unuaktaj, duaktaj eĉ kvaraktaj teatraĵoj kaj skeĉoj. Ankaŭ dramoj estis prezentitaj: La Lasta Viro (de F.X.Svoboda en traduko de D. Chlubnová, dum plaraj jaroj gvidantino de nia junularo, Ondro kaj Drako de V. Dyk, en traduko de J. Vondroušek, La Urso de Ĉeĥov, en traduko de la antaŭa. La nunan junularon gvidas M. Lorková. Ĉe la prezentadoj montriĝis veraj talentoj, estis admirata la entuziasmo, oferemo, sprito kaj inĝenio de la rolantoj.

Glora paĝo de la Klubo kaj ĝia fiero estas la artismaj koncertvesperoj, veraj kulturaj eventoj. Ekde la jaro 1946 ĝis nun okazis pli ol 60 tiaj koncertoj (memore al datreveno de d-ro L.L. Zamenhof, minore al B. Smetana, al la 20-a datreveno de liberigo de nia lando, al la VIII-a Ĉeĥoslovaka Esúeranto-Kongreso, al la 50-a datreveno de estiĝo de nia respubliko, al la Konstitua Kongreso, al 80 kaj 85 jaroj de Esperanto, omaĝe al J.A. Komenský, Beethoven). Sed ne nur, ke la plej eminentaj artistoj de la brna muzika vivo kantis en la internacia lingvo famajn ariojn el la nacia kaj tutmonda repertuaroj en vere perfektaj tradukoj, temas ankoraŭ pri io multe pli grava: al unuopaj koncertoj estis elektitaj arioj kaj kantoj laŭ karaktero de la soleno kaj poste tradukitaj. Rezulto estas grandega riĉigo de repertuaro en Esperanto, la tradukoj formas daŭran trezoron de la muzik-literaturo en la internacia lingvo. Krom la jam cititaj artistoj necesas nomi pluajn: Václav Halíř, membro de Janáček-Operejo, Eliška Kalousová-Adlerová, Radislav Chudoba, L. Sehnürmachers orgenvirtuozo J. Ĉernovský, violon-virtuozo prof. A. Jíra k.3.

Konsiderinda estas ankaŭ literatura aktiveco de membroj de la Klubo. La plej multsignifa loko apartenas al Jiří Kořínek (ekde la j. 1964 vivanta en Ústí n. Labem),

pri kiu rajte fieras esperantistaro en Ĉeĥoslovakio kaj la cetera mondo. Li aktivas sur kampo de poezio kiel tradukita tiel originala. Libroforme aperis en Ljubljano poemaro de Jaroslav Seifert "Panjo". Plue prese aperis ĉefverko de Petr Bezruč Sileziaj Kantoj (en kunlaboro kun d-ro T. Pumpr kaj R. Hromada). Eh manuskriptoj estas lia traduko de la fama poemverko de Vítězslav nezval "Manon Lescaut", tuta opero de Ant. Dvořák "Jakobeno", ĉarma verko de K. V. Rais "Homoj kaj Bestetoj". Plua lia traduko de J. Seifert estas estas poemoj Kronplekto da Sonetoj. De li ekzistas originala poemo en la ĉeĥa lingvo Doktor Zamenhof. Tradukoj de oper-arioj kaj kantoj pruvas senkomparan traduk-kapablon de J. Kořínek kaj proksimiĝas al ducent. Ĉe Belartaj Konkursoj de UEA liaj tradukoj kaj originaloj estas taksataj per la plej altaj premioj. Dekoj da liaj poemoj kaj ankaŭ lingvaj traktaĵoj estas dissemataj tra la Esperanta gazetaro. En traduko de J. Vondroušek aperis verko de K. Čapek Libro de Apokrifoj. En manuskriptoj ekzistas de la sama: Rakontoj el unu poŝo, Rakontoj el la dua poŝo, ambaŭ de K. Čapek, Milito kontraŭ Salamandroj ankaŭ de K. Čapek, teatraĵo Ondro kaj Drako de Viktor Dyk, humura romano de Zdeněk Jirotka Saturnin. Al nia Klubo, kiel multjara honora membro apartenas prof. Th. Kilian, kiu krom la jam menciita traduko de la Blanka Malsano de K. Čapek estas aŭtoro de libroj Ekzercaro de Esperanto, aperinta jam en la tria eldono, ABC de la internacia lingvo, 808 vortoj (vortaro), La Mondo Rakontas, kaj aŭtoro de verketo Esperanto a jeho tvůrce (Esperanto kaj lia kreinto). Prof. Th. Kilian estas iniciatinto de la jam internacie konataj Someraj Esperanto-Tendaroj en Lančov. Infanleterojn por ĉeĥoslovaka parto de libro de l' Mondo, aperinta en Tokio, liveris M. Adamcová kaj marie Věrná estas aŭtorio de poemaro Dion adori. Inĝ. ark. Jan Werner redaktis bonegan junularan gazeton "Tagiĝo", kaj same vonegan revueton "Fajrero". Post foriro al Košice li transdonis la redaktadon al alia posteulo, kaj post nelonge la revuo ĉesis aperi. Inĝ. J. Werner laboras en la Teknika Sekcio de ĈEA pri teknikaj terminaroj kaj unuopaj terminaroj aperas sub lia redakto sur paĝoj de bulteno "TS informas". Inĝ. Aleš bednařík, nun en Bratislava, por akceli evoluon de la teknika lingvo laboras pri politeknikaj vortaroj kaj la rezultojn publikigas en la jam menciita bulteno "TS informas". Profesoro Josef Cink kompilis "Junularan Kantareton" kaj estas aŭtoro de "Ekzercaro de Esperanto por progresintoj." Milda Jakubcová estas anino de Esperanto-Rondeto ĉe la Unua Brna Maŝinfabrika en Brno, sed ankaŭ anino de nia Klubo. Laŭdevene latvino. Ŝia elstara poemkolekto estas Elektitaj Versaĵoj kaj ampleksa poemaro Estrado de animaloj. Rekonata poetino, ŝi tradukas el la latva poezio, multaj ŝiaj poemoj estas dissemataj en pluraj Esperanto-gazetoj. Ladislav Šebestík verkis monografion pri verko de fama astronomo el la 18-a jarcento Christian Jan Mayer en la ĉeĥa lingvo kun resumo en Esperanto. Ernesto Sonnenfeld, antaŭ la dua mondmilito li elmigris en Argentinon, esperantigis ĉefverkon de la argentina literaturo Martin Fierro de José Hernández.

Aŭtoro ne subskribinta, tamen verŝajne
Josef Vondroušek